

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 12

N-ro 3, 1982

Edistudio, Pizo, Italujo

Internacia Pedagogia Revuo - n-ro 3, 1982

fotokompostado: Edistudio, C.P. 213, I-56100, Pisa, Italujo, tf. + 39/50/48670
presado: Offset Vallerini, Pisa, Tf. + 39/50/48670

<i>Kelkaj pensoj pri la instruado de la internacia lingvo Esperanto</i>	Sonja Tavcar, Slovenio/Jugoslavio
<i>La ŝafo en la arbaro; Ni ludu per geografio; Mi amas katidon; Sardeskaj "Muttettus"</i>	—
<i>Ĉu la akuzativa gramatikaĵo en Esperanto estas neinstruebla kaj nelernebla?</i>	Bernhard Golden, Hungario
<i>Helpo por la Kastora Klubo</i>	Barbara Chmielewska, Pollando
<i>Parolado kaj prelegoj el la 16-a konferenco de ILEI en Seiano</i>	—
<i>La emancipa principo de Esperanto en la edukado-eblecoj kaj limoj</i>	Helmut Sonnabend, Germanio
<i>Ĉu la mondo vere bezonas internacian lingvon?</i>	Antony Mercieca, Malta
<i>Kelkaj konsideroj pri avangarda literaturo en Esperanto</i>	Nikolino Rossi, Italujo
<i>100 jara datreveno de Esperanto: la kontribuoj de ILEI</i>	—
<i>Aliĝilo por la 17-a konferenco de ILEI en Sintra/Portugalio</i>	

Kelkaj pensoj pri la instruado de la internacia lingvo Esperanto

de Sonja Tavčar, Slovenio, Jugoslavio

Oni ne traktu Esperanton kiel fremdan lingvon. Ĝi estu la dua lingvo por ĉiu homo. Precipe por la simpla homo. Por tiu, kiu ne havas tempon, monon, eblon, emon por lerni plurajn fremdajn lingvojn. Sufiĉas la internacia lingvo Esperanto por interkompreniĝi kun ĉiu samideano ie ajn sur la terglobo. Vere devas esti homoj kun proksimume samaj ideoj. Sed pere de Esperanto oni facile trovas samideanojn kaj amikojn.

Esperanton oni eklernu kiel la nacian lingvon. Ju pli frue, des pli bone. Sed se oni instruas nian lingvon al la infanoj, oni devas imiti la saman procedon, kiu okazis ĉe la gepatra lingvo. Unue *AŬDI, PAROLI* poste *legi kaj skribi*. Sed unue multe aŭdi kaj multe paroli, poste malmulte legi kaj malmulte skribi kaj ankoraŭ apude multe aŭdi kaj paroli. La LINGVON oni lernu per la LANGO. La lango devas multe moviĝi por esti tiel lerta en la dua «internacia» «lingvo kiel en la unua» «la nacia». Kelkaj instruistoj tro rapide legigas kaj skribigas la infanojn kaj tiel Esperanto iĝas simpla neinteresa lernobjekto kiel ĉiuj aliaj fakoj.

Se la infanoj en la malsupraj klasoj «antaŭ 11 jaroj» aĝaj komencas lerni nian lingvon, estus plej bone instrui 3 foje semajne po 20 minutoj, ol 2 foje po 45 minutoj. Sed tiel nur povas instrui la klasestro de la koncerna klaso. Kiam Esperanto-instruisto venas en la klason por 45 minutoj, li devas al la instruado kombini desegnadon, kantadon, gimnastikadon, dancadon, prezentadon, diversajn ludojn, ĉio en Esperanto! — sed distre, vikle. La horo aspektu alie ol la simpla instruohoro. Ia hejmeca atmosfero estu alloga, poste la infanoj ekamos la duan lingvon kaj retenos ĝin. Post aŭdado, parolado, kantado, ŝercado ili komencu legi kaj skribi por tute konkreta celo: por la korespondado. Nur se la infanoj baldaŭ havos kontaktòn kun samaĝuloj el alia lando, el diversaj landoj, la lernado estos interesa kaj havos sukceson kaj daŭrigon.

La instruisto devas ĉiam sekvi la principon: de la facila al la pli malfacila temo, de la simpla al la pli komplika.

Por la komenco elektu tiujn vortojn, kiuj en la gepatra lingvo plej similas al Esperanto, oni nur traktas la finaĵon -o.

Por la slovenaj infanoj tiuj vortoj estas: papero, koverto, banano, citrono, skatolo, ĉokolado, vazo, kreto; tre similaj estas la vortoj tabulo, kreto; sidi, stari; sekvas la tre similaj vortoj: vino, kafo, nomo, glaso ktp.

Por la germanaj infanoj oni povas tuj mencii la vortojn: bildo, taso, lampo, knabo, knabino, biero, cigaredo, tuko, tago, monato krom la vortoj, kiujn mi jam menciis por slovenaj infanoj.

Inter la unuaj novaj vortoj estu por la infano la vorto: pilko «eble anstataŭ planko, kiu aperas en multaj lernolibroj, sed la vorto por infano ne estas interesa». Pilko povas esti ekblovebla kaj diverskolora. Tiel oni tuj je la komenco povas preni la esprimojn por la koloroj. Prenu kretojn, paperojn, kraĵonojn, envolvitan ĉokoladon, bombonojn ktp.

Por la unua leciono oni alportu ĉiujn objektojn kaj montru ilin. Ne desegnu, ne montru bildojn, vera objekto estas multe pli bona lernilo. Same oni uzas la objektojn, kiam oni instruas la prepoziciojn.

1. *Por la unua leciono* la infanoj jam povas memori laŭ versaĵetoj:

Blanka estas la papero, blua estas la kajero.

Flava estas la citrono, verda estas la kraĵono.

Se vi povas trovi konatan melodion, eĉ pli bone.

2. *Por la dua leciono* oni povas kanti «Rozo estas floro» laŭ la libro de d-ro Szerdahelyi *Esperanto I*, Budapeŝto 1972, paĝo 37. Sed mi proponas jenajn vortojn:

Rozo estas floro, kantas ni en ĥoro.

Hundo estas besto, loĝas bird' en nesto.

3. *Por la tria leciono* oni eklernu la pluralan finaĵon-*j* kaj daŭrigu la kanton laŭ la sama melodio:

Ni estas lernantoj, bonaj komencantoj

Esperanto nia lingvo internacia.

Tion oni povas danci kiel rondodancon. Ĉe la vortoj: Loĝas bird'... iras unu infano en la mezon de la rondo, elektas alian kaj ili en la mezo kune dancas dum la «Ni estas lernantoj...». Poste la dua restas en la mezo, la unua reiras en la rondon. Je la vortoj Loĝas... li elektas novan kundancanton ktp.

Tiam la rondo staras kaj klakas per la manoj. Kaj ĉio ripetiĝas.

4. *Por memori la infanojn pri akuzativoj*, krom la ĉiutagaj salutoj (Mi deziras al vi bonan matenon ...nokton ktp.), estas taŭga la poemeto el la libro Rakuŝa, *Esperanto I* (1967, Ljubljana), sur la paĝo 26:

La metiistoj

Panon bakas la bakisto,

ŝuojn faras la ŝuisto,

vestoj estas de tajloro,

aŭton gvidas la ŝoforo.

Meblojn faras la meblisto,

bildojn pentras la pentristo,

kukon bakas la patrin',
mi rapide manĝas ĝin.

Oni povas multe ekzercadi per la demandoj: Kion faras la bakisto? Kiu faras la...? Kiu bakas? Kiu pentras? Kion bakas la bakisto? Kion faras la ŝuisto? Ktp.

5. *Por rememori la tagojn de la semajno* estas taŭga la poemeto en la sama lernolibro (de Rakuŝa) sur la paĝo 37:

La tagoj de la semajno

Lundo, mardo kaj merkredo,

poste jaŭdo kaj vendredo,

nun sabato sekvas ĝin,

kaj dimanĉo ĉe la fin'.

6. *Kiam oni instruas la sufikson -et*, oni kantu tiun ĉi slovenan popolkanton, el la sama lernolibro de Rakuŝa, paĝo 31:

Sur montetoj suno brilas, sur montetoj suno brilas,

sur montetoj suno brilas, sur montetoj estas ĝoj'.

La birdetoj tie trilas, la birdetoj tie trilas,

la birdetoj tie trilas, floroj kreskas ĉe la voj'.

En tiu ĉi lernolibro estas ankoraŭ kelkaj ĉarmaj kantoj. Ankaŭ en la jam menciita lernolibro de d-ro Szerdahelyi troviĝas kelkaj kantindaj kantoj.

Kiam oni parolas pri bestoj, oni uzu bonajn bildojn aŭ la infanoj alportu ludilojn, bestojn el ŝtofo. Kiam oni parolas *pri la homa korpo*, oni prenu pupon kaj montru la partojn de la korpo. La infanoj bone parkerigos la novajn vortojn desegnante kaj dirante:

1. Punkto, punkto kaj streketo,
preta estas la kapeto

2. Rekta kolo, granda ventro,
tri butonoj en la centro.

3. Fortaj kruroj, lertaj manoj,
sur la kapo hirtaj haroj.

4. Ambaŭflanke ankaŭ komo,
preta estas ĉarma homo.

8. Kiam oni parolas *pri la familio*, estas priparolinda la rakonto pri "La karoto" d-ro Szerdahelyi, *Esperanto I*, paĝo 69. La infanoj volonte desegnas, povas esti granda kolektiva murbildo: La karoto, la avo kaj avino, patro, filo kaj filino, hundo, kato, muso, ili tiras kaj tiradis, finfine ili sukcesis eltiri la karoton.

9. Plej bona lernolibro por la internacia lingvo estas tiu, kiu estas plej internacia. Kie oni ne sentas tro da iu certa nacia atmosfero, kvankam oni devas eliri ĉiam el la plej natura, proksima ĉirkaŭaĵo de la infano.

Por krei *internacian scivolemon* al la infanoj mi proponas kiel aldonan legaĵon: "La aventuroj de Johanino kaj Kardo" en Espernto *Junulkurso*, ilustrita, Eldonis SAT-Amikaro, Paris 1952. Unue aperas eŭropaj urboj, tio povas esti por la unua lernoĵaro. La lecionoj 12 ĝis 20 povas esti uzataj kiel daŭriga kurso por la dua lernoĵaro. Samtempe oni povas uzi geografian karton, poŝtmarkojn, bildkartojn de la koncernaj urboj kaj landoj, tiel la infanoj lernas samtempe geografion je tre amuza maniero.

Jen, mi skribis kelkajn rimarkojn. Nur por la komenco. Daŭrigu vi! Skribu pri viaj spertoj, ludoj poemetoj ktp. Eble povas iu *komisiono ĉe ILEI* kolekti tiajn kontribuaĵojn al nia komuna metodika kaj didaktika helpilo?

Eble povas kolekti tiajn spertojn *la universitato en Budapeŝto, fakultato por Esperanto?*

Mi salutas ĉiujn instruistojn de nia lingvo kaj deziras al ni ĉiuj, ke ni per kunigitaj fortoj atingu bonajn rezultojn!



La ŝafo en la arbaro; Ni ludu per geografio; Mi amas katidon; Sardeskaj «Muttettus»

Elementa Lernejo «CEP»

Vojaĝo tra Sonbendujo atingis IPR-on. Infanoj kaj iliaj instruistoj en la elementa lernejo «CEP» en la urbo Kaljaro/Sardio verkis riĉan materialon, ĉio sur tri sono-bendaj kasedoj akompanataj de tre bela kajero kiu rilatas la enhavon de la kasedoj. Ili estas bone uzablaj en viaj Esperanto-klasoj. Eble vi «inventos» kune kun viaj infanoj melodion? Skribu ankaŭ al:

*s-ino Barbara Murgia - via Cilloco 57 - Pirri
Cagliari Italio*

La-ri-la-ri-la-le-ra
La-ri-la-ri-la-là!



La ŝafo en l' arbaro - bum!

- Montru al mi l' arbaron

Fajro ĝin bruligis



- Montru al mi la fajron

Akvo ĝin estingis

- Montru al mi la akvon



- Bovo ĝin eltrinkis



- Montru al mi la bovon

Mikelo ĝin mortigis

- Montru al mi Mikelon

La Morto lin forprenis

Montru al mi la Morton




La Morto ne ridiĝas

- Fimiĝis la rakonto

Rakontu do alian!

Ni ludu per GEOGRAFIO!


- Mi estas la SUNO: atentu! Ne tuŝu min!
Mi estas varmega!
- Ni estas la planedoj de la sun-sistemo
Kaj ni rondiras ĉirkaŭ la SUNO!
- Mi estas la Tero kaj mi rondiras
ĉirkaŭ la suno!
- Mi estas la LUNO kaj mi rondiras
ĉirkaŭ la Tero!
- El kio konsistas la sun-sistemo?
- La sunsistemo konsistas el la SUNO, la
planedoj kiuj rondiras ĉirkaŭ la suno,
la satelitoj kiuj rondiras ĉirkaŭ la
planedoj kaj aliaj pli malgrandaj ĉielaj
korpoj.
- Kio estas la SUNO?
- La SUNO estas stelo.
- Kiuj estas la planedoj de la sun-sistemo?
- La planedoj de la sun-sistemo estas naŭ:
Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero,
Saturno, Urano, Plutono.
- Kiom da tempo bezonas la Tero por fari
unu rondiron ĉirkaŭ la SUNO?



Mi amas Katidon
Kun varma vesteto
Ĝi amas min ankaŭ
la ĉarma besteto

mi certe ne kaŭzas
doloron al ĝi
Kaj do tre kontente
ĝi ludas kun mi.

Jen, antaŭ la fajro
la kara katido
manĝetas kaj trinkas
kun plena konfido!



KATIDO

Sardeskaj "MUTTETTUS"

Librojn kaj kajerojn
li tenas en la mano
Ĉar en la sako estas
fromaĝo, vin' kaj pano!



tra-la-lera le-ra-le-ra-la-le-ra
tra-la-le-ra le-ra-le-ra-la-la!

Ŝi portas blankan ĉapon.
mantelon kun la zono
li portas la ĉemizon
kaj bluzon kun butono!

Ŝi havas ungojn ruĝajn
ja kiel fraŭlino
sed ŝia cerbo estas
kiel tiu de kokino!



TRA LA LERA!



Ĉu la akuzativa gramatikaĵo en Esperanto estas neinstruebla kaj nelernebla?

Bernard Golden

En *La Brita Esperantisto* (januaro-februaro 1982, p. 99) aperas jena citaĵo el grava dokumento verkita de d-ro Zamenhof, "Pri neologismoj — cirkulera letero al membroj de la Esperantista Akademio", kiu datiĝas de la jaro 1909.

"Sed ni ne faru filologiajn analizojn, ni rigardu la aferon de vidpunkto praktika, kaj tiam ni devos diri al ni: por la personoj, kiuj bone ellernis la lingvon Esperanto, la akuzativo prezentas nenian maloportunaĵon, sed kontraŭe, veran necesajon: ĝi prezentas nur kelkan malfacilaĵon por kelkaj komencantoj (ĉe kelkaj popoloj), sed ĉu ne estas pli bone kaj pli juste, ke tiuj komencantoj iom pli laboru kaj perfektigu, ol ke pro ili ni ĉiuj, en la nuna tempo kaj en ĉiuj estontaj generacioj, uzadu lingvon neprecizan kaj lamantan: ĉu ne estas pli bone, ke *ili* en la *nuna* tempo uzu la lingvon iom erare, ol ke ni *ĉiuj* kaj *ĉiam* suferu neoportunecon?"

En alia numero de la sama revuo (septembro-oktobro 1981, p. 68) oni povas legi tiun ĉi rimarkon pri nova koresponda kurso.

"Cetero mi alte aprezas la ideon enkonduki la akuzativon en la unua leciono, ĉar rezulte de tio oni kutimiĝas al ĝi ek de la komenco, kaj ne vane lernas tri-kvar lecionojn antaŭ ol konstati ke oni neniam majstras la ununuran gramatikaĵon kiun multaj angleparolantoj trovas iom stranga."

Kion estus dirinta la aŭtoro de Esperanto pri tiu hereza aserto, ke ekzistas gramatikaĵo en Esperanto, kiun "oni neniam majstras"? Zamenhof substrekas, ke temas nur pri *kelka* malfacilaĵo por *kelkaj* komencantoj apartenantaj al *kelkaj* popoloj. Inter ili tutcerte estas la angloj — aŭ angleparolantoj — sed ĉu nur la heredintoj de la lingvo de Ŝekspiro stumblas ĉe la akuzativo? Absolute ne! Povas esti, ke nur ili ne timas malkaŝe konfesi, ke ne temas pri maldiligentaj komencantoj, kiel aludas Zamenhof. Ni faru superrigardon de la lingvouzo en kelkaj diverslandaj periodaĵoj por vidi, kiaj eraroj estas faritaj — de *nekomencantoj*!

El Francio

- a. "Por Djerba komenciĝas neĉesan 7-jarcentan lukton por defendi sian sendependecon ..."
- b. "... ŝi unue instaligis pupteatron, sur kiu tre videble troviĝas la daton de ĝia konstruo ..."

En ambaŭ citaĵoj la *subjekto* de la frazo, kiu sekvas la netransitivajn verbojn "komenciĝas" kaj "troviĝas" respektive, estas en la akuzativa kazo! Relative ofta estas tiu tendeco akuzativigi substantivon, kiu funkcias kiel subjekto, se la vortordo estas inversa, kaj la verbo estas netransitiva.

El Israellando

- c. "... ĉu ne eblas eluzi tiun fakton por pligrandigi la pluvon en Israelo uzante bakterion anstataŭ kemiajn substancojn."
- d. "... sed mi ne riproĉis iun ajn, krom la verkistojn de Biblio."

Laŭ la Fundamenta gramatiko de Esperanto, "ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon." La akuzativo estas bezonata, kiam prepozicio ne signifanta almonvon estas uzata kun almov-verbo. Malpli ofte la akuzativo povas sekvi prepozicion, se estas danĝero de ambigueco. En la ĉi-supraj citaĵoj, ne estas iu ajn kialo akuzativigi la substantivon post "anstataŭ" kaj "krom".

El Jugoslavio

- e. "FRĴIĈ en siaj verkoj malkasās sin kiel vera renesanca homo ..."
- f. "Respektante la demokratecan principon kiel nepra kondiĉo por memmastruma kooperado en socialisma Jugoslavio oni ne povas neglekti la lingvan problemon."

En ambaŭ frazoj, tuj post "kiel" sekvas adjektivo kaj substantivo en la nominativa kazo, kvankam ili rilatas al la akuzativigitaj vortoj "sin" en "e" kaj "principon" en "f".

El Anglio

- g. "Oni devas atendi ĝis tri jaroj por akiri ilin."
- h. "Tiu aliaj kiuj uzas ĝin devos scii ke la notacio por gitaro estas oktavo pli alta ol la sono."

"Ĝis tri jaroj" kaj "oktavo pli alta" estas mezuradjektoj, do ili devas montri tion per la akuzativo aŭ per prepozicio kiel "je" (je oktavo pli alta = oktavon pli alta). En "g" la prepozicio "ĝis" rilatas nur al la numeralo "tri", ne al la substantivo "jaroj"; oni, do, devas diri "ĝis tri jarojn".

Estas eble daŭrigi tiun ĉi ilustradon de gramatikaĵo, kiu, malgraŭ la eldiro de Zamenhof, ja prezentas malfacilaĵon por multaj homoj. Se eraroj konstante aperas en publikigaĵoj, ilia kvanto estas multobla en korespondaĵoj kaj en la parola lingvo.

Laŭ mia scio, neniuj programoj de instruado estis formulita ĝis nun por malpli-

grandigi kaj finfine forigi la maloportunaĵon de la akuzativo en Esperanto. Grava kaj urĝa demando por instruantoj de la Internacia Lingvo estas jena: ĉu estas eble per lingvopedagogia metodologio eltrovi manieron atingi tiun celon? Jam plurfoje instruantoj de Esperanto kun la helpo de profesiaj edukistoj kaj lingvistoj starigis instruad-eksperimentojn por pruvi, ke Esperanto estas pli facile lernebla ol iu ajn etnolingvo. Ju pli oni eksperimentas, des pli oni atingas la samajn rezultojn. Estas eble montri, ke Esperanto estas *relative* pli facila ol lernanta etnolingvo, sed ĝis kiu grado ĝi estas *absolute* facila lingvo? Post la lernado, eraroj persistas, kaj eĉ post plurjardeka uzado de la Internacia Lingvo, ne estas eble elradikigi ĉiujn misaĵojn.

Jam estas tempo fari eksperimentojn pri la instruado de la gramatiko mem por ekscii, kiel estas eble plej efike superi ĉiujn malfacilaĵojn. Eble oni povas evoluigi senfiaskan metodon por instrui ankaŭ la akuzativon.



Helpo por la Kastora Klubo

Jus kuŝas antaŭ mi nova «Grupa Letero» de la Kastora Klubo. Kiu plenumas gravan taskon. Skribis i.a. s-ino Barbara Chmielewska:

Kiel gvidantino de la Kastora Klubo, kiu ekde Januaro 1980 havas sian sidlokon en Varsovio (Pollando) mi petas de ILEI helpon en la agado de tiu ĉi internacia porinfana Esperanto-klubo. Ĝi konstante disvastiĝas (nuntempe aliĝis al la klubo ĉ 2000 personoj el 52 landoj) kaj malgraŭ mi jam ricevas helpon de diversaj polaj instancoj (precipe de PEA) estas bezonata mecenateco. ...mi opinias, ILEI estas la plej kompetenta.

Mi petas ĉiujn membrojn de ILEI je financa helpo kaj asigni la monon en la kason de ILEI. La kutimaj membro-kotizoj ne ebligas solidan helpon.

Parolado kaj prelegoj el la 16-a konferenco de ILEI en Seiano:

La emancipa principo de Esperanto en la edukado-eblecoj kaj limoj

Helmut Sonnabend

Estimataj gesinjoroj, la temo de la inaŭguro de nia 16-a konferenco nomiĝas “La emancipa principo de Esperanto en la edukado — eblecoj kaj limoj” kaj mi petas vin, bonvolu tie ĉi kompreni la emancipiĝon per lingvo. Kunlige kun nia temo ni analizu la nocion “emancipito”: kiu rilatas al la homo.

La emancipita homo estas liberigita de ĉia kuratora povo. Kutime oni ligas emancipon kun la virinoj, kiuj finfine strebas esti liberigitaj de vira kuratoro.

Sed lingva emancipiĝo celas esti libera de aŭtoritato — de lingva aŭtoritato kaj kuratoro. La lingva emancipiĝo estas tute nova kaj juna problemoj kaj ekestas el la absoluta hegemonio de kelkaj grandaj lingvoj kaj per ili la dependo de miliardoj da homoj.

Kaj tio havas sian evoluon!

Ni ofte aŭdas, ke la pordoj al la mondo estas la lingvoj. Kaj fakte, homo kiu neniam lernas alian lingvon ol nur la sian estas kvazaŭe alkröĉita en la loko, en kiu li vivas. Neniam lerninte alian lingvon, tiu homo dependas de tiaj informoj kiel ili estas prezentitaj al li — subjektivigitaj, farbitaj kaj filtritaj.

Proksimume ĝis la tempo antaŭ la dua mondmilito estis la kono de fremdaj lingvoj nur atributo de la pli altaj sociaj tavoloj. Fremdlingva instruado okazis en gimnazioj kaj mezgradaj lernejoj.

La ordinara homoj ĝenerale ne lernis fremdajn lingvojn. La infanoj en la plimulto vizitis nur la popol-lernejon en kies horaro fremdaj lingvoj ne estis antaŭviditaj. Post la vizitado inteligentaj kaj diligentaj junuloj vizitis t.n. vespero-lernejojn por frekventi fremdlingvajn kursojn. Gelernintoj de popol-lernejoj lernis iun praktikan profesion. Nur lingve edukitaj homoj studis en universitatoj.

Tamen — dum tiuj ĉi tempoj oni ne sentis antagonismon inter la diversaj konceptoj de la klerigado. La ordinara homo ne sentis mankon. Per fremdaj lingvoj oni celis la elitajn edukadon de privilegiitaj tavoloj.

Unue post la dua mondmilito kreskis la ĝenerala bezono al pli da klerigado por ĉiuj homoj kaj lingva interkompreniĝo. La lingva situacio de fremdlingva instruado estas esence determinita de nur kelkaj lingvoj. Ili estas la angla, franca, germana kaj rusa lingvoj.

Ili aspektas kiel lingva kvaropo, ĉar ĉiuj aliaj lingvoj ne estas ĝenerale instruataj kiel fremdaj en la lernejoj. La kvar lingvoj superas la ceterajn eŭropajn je 52,4%. 19,9% apartenas al la rusa lingvo, 15,1% al la germana, 9,0% al la angla kaj al la franca lingvo apartenas 8,4%.

Ni konsideru ke inter la kvar lingvoj la angla posedas la plej grandan influon. Kio estas nun la kaŭzoj de la granda influo? Ili estas certe diversaj, sed unu estas historia.

Ni rememoru: kiam Britujo kaj Francujo jam estis grandaj ŝtataj potencoj, la germanoj ankoraŭ revis pri sia ŝtata unueco kaj la rusoj digestis siajn aziajn konkerojn. Iom post iom same establiĝis la germana kaj rusa lingvoj.

Hodiaŭ posedas ĉiu de la kvar lingvoj siajn influferojn: rekte influas la angla lingvo sian lernadon en la norda parto de Eŭropo, tre forte dominas en Germanujo kaj enpenetris same en sudaj landoj kaj eĉ havas influon en socialismaj landoj.

Klare ekkonebla estas la influo per frua kolonia okupado en Aŭstralio, Usono, Hindio, orienta Azio, Kanado kaj Afriko. Ĝi ludas gravan rolon en scienco, ekonomio kaj politiko. De tute alia kvalito estas la influo de la rusa lingvo. Antaŭ la dua mondmilito neniu — krom kelkaj inklinuloj — lernis la rusan lingvon devige en la nunaj socialismaj landoj krom Polando, kiu ŝtatiĝis unue post la unua mondmilito.;

Nun ĉiuj infanoj en ĉiuj socialismaj landoj lernas kiel unuan fremdan lingvon la rusan. En ĉiuj nesocialismaj landoj vi trovos la rusan lingvon en la lernejo en la formo de libervolaj laborgrupoj kaj ankaŭ en popolaltlernejoj.

La franclingva influo estas ĉe ni dua elekto en la lernejoj (gimnazioj) kaj ĉefe deviga. Ĝi influas sudajn landojn en Eŭropo kaj lasis sian influon en iamaj kolonioj.

La influo de la germana lingvo estas pli indifera: sed multaj Turkoj, Grekoj, Hispanoj kaj Italoj jam rekte lernis en Germanio kaj ĝi estas studfako en multege da lernejoj.

Mi esperas, estimataj gesinjoroj, ke mi ĝis nun ne tro streĉis vian atentecon, sed mi konsideras mallongan retrorigardon al la lingvoinstruado en la senco de la temo grave.

Mi demandas, ĉu tiu ĉi lingva sistemo ebligas la gelernantojn, la homojn lingve emancipiĝi? Mi kredas ne! Tute kontraŭe — la lingva dependeco nur pligrandiĝas. Ekzemple angledivena homo vojaĝanta tra Eŭropo povas esti certa, ke ĉefe popolanoj de malgrandaj lingvoj fervore klopodas lerni lian lingvon.

Tio ne estas emancipiĝo sed sola adaptiĝo al la angla lingvo.

Sed ankaŭ anoj de ceteraj grandaj lingvoj elegante aŭ stumbe respondas la demandojn de la angla turisto.

La plimulto de la Angloj kaj Usonanoj abrupte ĉesigas sian fremdlingvan studadon se ili tute prave konjektas, ke tre multaj, ĉu en Germanio, ĉu en Hungario studas ilian lingvon.

Tiel ankaŭ pliiĝas la informoj el Usono: studentoj ĉiam pli rezignas studi fremdajn lingvojn.

Nun tamen estas Angloj/Britoj kiuj lernas aŭ la francan aŭ la germanan lingvojn — kaj por ili ne plu ekzistas lingva problemo. Do, propre ni devus bedaŭri, ke ni ne naskiĝis kiel angloj.

Ankaŭ por germanoj estas la lingva situacio sufiĉe bona. Ili ĉiam estas tre kontentaj, ke ili renkontas germanparolantajn homojn ĉie en Eŭropo. Ili sentas, ke Germanio havas bonan signifon en la mondo.

Same la francoj renkontas sufiĉe da francparolantaj homoj. Jen ni observas grandan avantaĝon kiun havas lingvanoj de franca, germana kaj angla lingvoj.

Jam la propra lingvo kovras sufiĉe grandan lingvan terenon kaj sufiĉas lerni duan por esence pligrandigi la lingvaj eblecojn.

Sed ĉiuj aliaj popoloj ĉiam devas lerni unu lingvon el la “grandaj lingvoj”, se ili ne intencas riski resti sen internaciaj kontaktoj. Sen adaptiĝo al la “grandaj lingvoj” tiuj homoj ne povas kaj kapablas solvi siajn lingvajn problemojn. Se estas nun unu de ili kune kun grandlingvanoj li sentas sian dependecon.

Ili ne estas liberaj de lingvaj kuratoroj — *do, lingve ili ne emancipiĝis.*

La homo, kies lingvo ne estas parolata de anoj de aliaj “grandaj lingvoj” restas senŝance, se li ne lernas lingvon sufiĉe vastigita. Li ankaŭ bone konsciiĝas, ke li sen adaptiĝo al granda lingvo ne partoprenas *profesian, intelektan kaj socian evoluon.*

Sed multaj kaj eĉ la plimulto da lernintoj ne sufiĉe sukcesas kaj ne kapablas paroli la lernitan lingvon.

Sen havante la necesan lingvan intelekton oni neniam lernas sufiĉe la deziritan lingvon. Rilate la lernadon de fremdaj lingvoj ni diferencigu inter lerni, lernigi kaj instrui. Kiu instruas, anticipas ke la instruato lernas — *do, fariĝas lernanto.* Rilate la lingvo-instruadon la infano fariĝas pli kaj pli viktimo ol lernanto. Ĝi ne lernas sed nur estas lernigita. La infano ne elektas lingvon — ĝi estas altrudita de instancoj.

Post la lerneja tempo multaj junaj homoj estas konsternitaj pri la manka rego de la fremda lingvo. En internaciaj renkontoj ili ne kapablas kompreni kaj aktive partopreni diskutojn.

Ili rimarkas la grandan distancon inter si kaj la fremda lingvo, kaj malsukcesis adaptiĝi.

Ni devas malfermi la vojon al lingva emancipiĝo. Sed ĉiuj naciaj lingvoj ebligas nur la adaptiĝon.

Kiam ekzemple ILEI finis sian duan lernejan eksperimenton en okcidenta Eŭropo inter dekdu lernejoj, ni aranĝis “Internacian Lernejon”. Ĝi okazis en St. Gerard/Belgio.

La lerneja eksperimento esploris, ĉu infanoj el diversaj landoj, diversaj lingvoj kaj diversaj lernejoj sistemoj diversloke kaj samtempe laŭ difinita plano akiras dum du jaroj sufiĉe da lingvokono en la Internacia Lingvo Esperanto por sukcese parto-

preni Internacian lernejon.

Kunvenis 144 infanoj el Francio, Nederlando, Belgio, Germanio kaj ankaŭ grupo el Jugoslavio.

Unu semajnon ili estis instruataj en ok klasoj de 12 diverslingvaj instruistoj en diversaj fakoj — en nur unu lingvo — en Esperanto!

Do, ne iu granda nacia lingvo postulis adaptiĝon kaj donis nur lingvan avantaĝon por siaj infanoj — Esperanto donis al ĉiuj la samajn ŝancojn!

En Grésillon/Francio kunvenas dum printempo ĉiunjare infanoj el diversaj landoj de Eŭropo. Antaŭe ili lernis Esperanton en siaj lernejoj — kaj ili aplikas la lingvon. Ili komune kantis, ludis, ekskursis, aktorisis kaj parolis — *en unu lingvo* — kune kun fremdaj instruistoj — sen altrudi la sian.

Tiun iradon ni nomas lingvan emancipiĝon.

Jam en pluraj lernejoj la infanoj lernas Esperanton kaj per ĝi estas flegitaj kontaktoj de lernejo al lernejo, de klaso al klaso.

En la edukado al lingva emancipiĝo sekvas I.L.E.I. jenajn principojn:

Por lingve liberigi lernantojn de iu lingva hegemonio kaj kuratoro, ili bezonas lingvon, kiu

— ne pretendas adaptiĝon al ĝia kuratoro kaj ne favorigas siajn lingvanojn.

— sendependigas de la nuna lingva instrusistemo,

— ne fortigas nacian lingvon,

— la instruata lingvo devas esti plene neŭtrala kaj nur servi al la homo mem.

I.L.E.I. konsekvence sekvas siajn principojn, jam kreis multajn modelojn kaj intencas krei novajn.

Modelojn, kiujn ĉiu povos kontroli, observi, estas modeloj por preni, tuŝi kaj kapti, modeloj, kiuj demonstras kaj pruvas la eblecon lingve emancipigi la homon.

(Cetere, ankaŭ nia konferenco pruvas la saman fakton.)

Ne temas pri la enkonduko de Esperanto pro Esperanto, kaj ankaŭ inter ni kiuj komprenas min ne lernis la lingvon pro la lingvo. I.L.E.I. ne intencas nur aldoni novan lingvon en la lernejoj, ne intencas enkonduki novan ideologion, — sed volas kontribui al la ĉefa celo de ĉiu edukado: la plenaĝa, spirite matura homo.

Ne temas nun, ke la nuna fremdlingva instruado malaperu; kiu deziras lerni multajn fremdajn lingvojn faru tion, se li preferas malŝpari sian tempon.

Sed ni deziras inversigi la lingvan sekvon:

— unue lerni neŭtralan lingvon por lingve emancipiĝi

— kaj tiam kiel lingve libera homo adaptigi al si naciajn lingvojn.

Sed nia agado limiĝas al fortaj baroj! Esperanto ne havas sian lobion (subtenantoj) aŭ iun potencon:

ĝi servas al nenies intereso

ĝi baziĝas nur sur la komprenemo de la homo —

kaj ni povas aserti:

tiu komprenemo kreskas, ju pli malgranda estas la lingvo kaj per ĝi la signifo.

La ŝtatoj de la “grandaj lingvoj” entute ne apogas Esperanton kaj la Esperanto-Asocio en tiuj ĉi landoj ne posedas signifan socian rolon.

Niaj malamikoj en la tereno de la grandaj lingvoj nomiĝas
ironio
malhelpo
neglekto
malkomprenemo
ĝis totala rifuzo

kaj tio estas niaj limoj!

Iam mi skribis al la prezidento de nia Federacia Respubliko Germanujo pro Esperanto. Ĝentile li respondis:

... "Aliflanke estu konsiderata, ke la instruminstroj de la federaciitaj landoj estantece ne intencas enkonduki Esperanton en la lernejan instruadon.

Realigo de via sugesto nun ne eblas. Restas nur atendi, ĉu la helpo, kiun spertas Esperanto en eksterlando fariĝos tiel prema, ke al pli estonta tempopunkto ankaŭ la lernejoj en la Federacia Respubliko Germanujo ne plu povos fermi sin al Esperanto kiel ĝis nun." ...

Jes, li pravas!


I.L.E.I. alvokas ĉiujn landojn en la mondo kiuj ĉiam daŭre estas devigataj adaptiĝi al la grandaj lingvoj, sekvi la vojon de lingva emancipiĝo por tiel regajni lingvan liberecon kaj sendependecon.

Sonnabend lerneja eksperimento

157 paĝoj
sciencnivele
prilaboritaj
flulegeblaj
kaj kaptaj
kiel romano

12 gld.

Edistudio, 1981
c.p. 213 I-56100 Pisa



Ĉu la mondo vere bezonas internacian lingvon?

Antony Mercieca

Kvar mil milionoj da homoj loĝas en la mondo. Eble aliaj diras ke homoj vivas aŭ eĉ ekzistas sur la tero. Por mi, la tuta homaro estas vere unu familio. Familio loĝas. Ĝi ne vivas aŭ ekzistas. Nur bestoj, birdoj, fiŝoj kaj arboj vivas. Nur montoj, dezertoj kaj riveroj ekzistas.

Tamen membroj de la sama familio parolas tri mil malsamajn lingvojn. Kiu vere kredas ke alilandano, kies lingvon li ne komprenas estas lia frato? Ĉiutage tra la tuta mondo aviadile, trajne kaj ŝipe oni renkontas homojn, kun kiuj li ne povas komuniki ĉar ne ekzistas komuna lingvo inter ili. Kiel oni povas scii kion ili volas, ŝatas aŭ eĉ bezonas se li ne povas kompreni ilin?

Internacia lingvo jam ekzistas ekde 1887. Ĉu la homaro vere volas interkompreniĝi? Bedaŭrinde ili ne volas tion fari. Mi aŭdis multajn sensencaĵojn pri la tuta afero. Unue oni diras ke hodiaŭ la homoj ne havas tempon por lerni alian lingvon, ankaŭ se ĝi estas Esperanto. Mi tuj demandas: por kio, do ili havas tempon? Ĉu por rigardi televidon, filmojn kaj spektaklojn? Ĉu por ludi, danci, promeni, babiladi aŭ tut-simple beligi sin?

Ĉiuj havas tempon por manĝi kaj trinki. Ĉiuj havas tempon por ĝui tion, kion ili ŝatas. Kiu ne trovas tempon por amindumi se li ŝatas tion fari? Kiu ne trovas tempon por iri al la Sankta meso se li estas bona romkatoliko? Kial iuj iras ĉiutage kaj aliaj iras nur dimanĉe? Ĉu tiuj kiuj iras ĉiutage agas tiel pro la fakto ke ili havas pli da tempo aŭ pro la fakto ke ili pli sincere kredas tion, kion ili faras? Mi devas ĉiam memori ke la homoj faras nur tion, kio al ili estas utila. Kial pastro iras labori kiel mi-siisto en tre fora lando? Kial monaĥino eniras monaĥejon por preĝi ĉiutage dum la tuta vivo ne elirante el la monaĥejo eĉ por aĉeti la ĉiutagaĵojn? Kial oni faras piroteknikaĵojn por la paroĥaj festoj kiam oni scias ke la plej eta eraro povas rezultigi la plej grandan eksplodon kun la morto kiu sekvas? La 17-an de Majo ĉijare je kvarono antaŭ la sepa vespere. la piroteknikaĵejo de Qormi en Malto, kie mi loĝas, eksplodis, skuante la tutan vilaĝon. Tri viroj mortis.

Kial milionoj kaj milionoj de homoj interesiĝas pri futbalo dum aliaj simple ne scias ke la monda konkurso pri futbalo ĵus okazis? Ili eĉ ne scias ke ĝi okazas. Por ili futbalo estas neniaĵo.

Iun tagon instruistino demandis al eta knabino: “Johanino, kio okazis la 6-an de aŭgusto 1945?”. La etulino cerbumis iomete. Poste laŭte kaj fiere ŝi kriis: “Tiutage mi naskiĝis!”.

Por ŝi tio estis la plej grava evento. Atombombado ne signifis ion ajn por ŝi. Sed por la homaro ĉu la naskiĝo de Johanino estis la plej grava evento? Efektive ĉu la eksplodo de la unua atombombo sur la homoj estis la plej grava evento tiutage por la plej granda parto de la homaro? Bedaŭrinde multaj ne interesiĝas. Ili simple diras: “Mi ne scias. Mi ne memoras eĉ tion, kion mi manĝis hieraŭ.”

Ni devas memori ke diversaj estas la interesoj de diversaj homoj. Povas okazi ke eĉ mondskuaj eventoj ne interesas milionojn da homoj. Ĉu tiaj homoj vere bezonas internacian lingvon? Tiuj, kiuj tion asertas estas la plej grandaj fantaziemuloj en la mondo. Kaj Esperanto ne marŝas antaŭen. Eĉ reĝoj kaj reĝinoj, prezidentoj, ĉefministroj, ministroj (precipe tiuj pri edukado), ambasadoroj kaj komercistoj ne sentas la bezonon lerni la internacian lingvon.

Ni ĉiutage vidas dum la televidnovaĵoj gravulojn en la Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kiuj metas tiujn monstraĵon ĉe la oreloj por kompreni tion, kion la preleganto estas diranta.

Ĉu ili vere bezonas internacian lingvon? Alivorte, ĉu ili vere volas interkompreniĝi? Buŝe ĉiuj diras ke ili volas kompreni tion, kion la alia diras. Sed kion ili faras intertempe? Nenion! Ĉu vi iam ajn aŭdis pri iu ajn ambasadoro kiu kriis ke li ne volas surmeti tiun monstraĵon ĉe la oreloj? Ĉu vi iam ajn atente observis kiel absurdaj kaj ridindaj estas la homoj kun tiuj monstraĵoj ĉekape? Imagu vin parolante al via edzino, patro, patrino, filo aŭ filino TIEL. Kia kompatinda familio estas la homaro!

Ni devas esti realistoj. Tia estas la situacio. Eĉ sciencistoj ne bezonas internacian lingvon. Efektive estas ili kiuj senĉese inventas monstraĵojn por forgesigi al konferencanoj ke lingvo-problemo ekzistas.

Imagu, vi entuziasmuloj pri unu lingvo por la tuta mondo, kiel kamparano kiu ne havas sufiĉe da mono por vojaĝi turiste, povas iam ajn senti la bezonon de internacia lingvo! Precipe se li neniam aŭdis pri ĝi. Provu diveni kiom da homoj ne scias ankoraŭ ke internacia lingvo vere ekzistas.

Kion ni devas fari?

Ni devas lerni ke la homaro ne nur ne bezonas internacian lingvon. Ĝi ne bezonas multajn pli gravajn aferojn. Multaj ne bezonas manĝaĵojn. Ili preferas morti! Tujare ni aŭdas kaj legas pri la malriĉuloj de la tria mondo. Por la homaro ne ekzistas nur unu mondo. Ekzistas tri mondoj! Kiu familio estas dividita en tri kategorioj? Verŝajne nur la homaro. Tio estas ega absurdaĵo. Kiu decidis nomi multajn landojn “la tria mondo”? Tutcerte ne la mizerulo kiu estas mortanta sur la trotuaro en malriĉa lando.

Ĉu li scias ke iu delegito en monda konferenco post bonega tagmanĝo decidis paroladi pri la malsato en la tria mondo? Ĉu scias ke tiu delegito estis aplaŭdata kiam

li diris ke oni bezonas manĝigi la tutan homaron? Kio rezultis el tiu prelego? Nenio krom la fakto ke la kelnero afable manĝigis la delegiton en luksa hotelo.

Ĉiu ajn Esperantisto povas imagi ke antaŭ ol li mortis, tiu mizerulo arde pensis pri Esperanto kiel la solvo al ĉiuj homaj problemoj? Estas pli facile por mi pensi ke por li la morto estis la solvo almenaŭ por ĉiuj liaj problemoj.

Multaj homoj ne bezonas medikamentojn. Ili preferas morti! Ili vivas en tiel abomenindaj kondiĉoj de malriĉeco ke ili ne faras ion ajn por sanigi sin. Ili eĉ ne havas la emon por forpeli muŝojn elsur la vizaĝo. Kiu ne rigardis tiujn kompatindajn spektaklojn sur la televido? Kion ni faris post la televida programo? Aŭ ni eĉ ne volis rigardi la programon ĝis la fino? Tamen tia malriĉeco ekzistas! Mi estas tutcerta ke oni sukcesos instrui Esperanton al tiuj muŝoj pli rapide ol la tiuj mizeruloj. Kial anoj de la sama homaro vivas en tiel terura mizero? Ili ne kulpas. Ili estas kiel birdoj kiuj kantas en kaĝoj. Kiam oni kaptas birdon kaj metas ĝin en kaĝon ĝi ne komencas kanti subite pro ĝojo. Iom post iom ĝi forgesas ke ekzistas la ĉielo. Ĝi forgesas ke ĝi kapablis flugi kien ajn ĝi volis. Sur arbojn! Sur tegmentojn! Sur montetojn! Eĉ rekte al la nuboj!

Pro ĝi la eta kaĝo fariĝas la tuta universo. Bonvolu memori ke la plej granda kaĝo en la mondo estas etega malliberejo por la birdo.

Sed la belega birdo forgesas. Almenaŭ ĝi manĝas. Ĝi trinkas. Do ĝi kantas.

Multaj malriĉuloj de la mondo ne manĝas, ne trinkas, ne sanigas sin, ne lernas Esperanton. Ili mortas!

Multaj homoj ne nur ne bezonas internacian lingvon, ili eĉ ne bezonas la pacon. Ili manĝas kaj trinkas. Ili estas fortaj. Ili estas fieraj. Kvankam ili ne lernas la internacian lingvon ili sukcesas kompreni al ĉiuj, tion, kion ili volas. Ili faras bombojn kaj ĵetas ilin sur la loĝantaron de najbara aŭ fora lando. La rezulto de bombeksplodoj estas sama en la unua, dua kaj tria mondo! Detruo kaj morto!

Ne estas stranga fenomeno ke Hitler kaj Stalin estis du el la plej grandaj malamikoj de Esperanto. Militistoj ne komprenigas sin per internacia lingvo. Ili komprenigas sin per armiloj, detruo kaj morto. Pensu iomete pri la unua kaj dua mondmilitoj, se vi ne volas pensi pri la hodiaŭaj militoj tra la mondo.

Ĉu soldato kiu iras mortigi aliajn soldatojn pensas pri interkompreniĝo? Tute ne. Do li ne bezonas internacian lingvon. Li bezonas la plej modernajn armilojn por detruu siajn fratojn. Pardonu, sed por mi ankaŭ en tiuj okazoj la homaro estas unu granda familio. Iam mi legis revuon kie oni kriis ke la loĝantaro devus uzi Esperanton por detruu la malamikon. Pli grandan absurdaĵon mi ankoraŭ ne legis ie ajn en la esperanto-gazetaro. Imagu, D-ro Zamenhof, la pacema kreinto de la internacia lingvo legante tion!

Kiu konstruas lernejojn, pensas pri instruado. Kiu konstruas hospitalojn pensas pri sanigado. Kiu konstruas stratojn pensas pri veturiloj. Sed pri kio pensas tiu, kiu konstruas hidrogenajn bombojn? Ni estu sinceraj al ni mem. Ĉu li pensas pri Esperanto kiel komprenigilo por la homaro? Aŭ li pensas pri la detruo de la planedo mem? Se liaj pensoj fariĝos realaĵo, la homaro ne bezonos eĉ unu el la tri mil regionaj lingvoj. La internacia lingvo estos superflua. En tombejoj oni ne parolas pri

lingvoj. Mortintoj silentas.

Ni esperantistoj havas grandegan laboron antaŭ ni. Ni devas konvinki la homaron ke ĝi bezonas internacian lingvon. Nur tiam ĝi estos vere unu granda familio. Ni devas unue konvinki nin mem ke nia laboro estas serioza kaj utila por la homaro. Kiel oni devas konvinki malriĉulon ke li devas manĝi, trinki kaj vivi, tiel ankaŭ ni devas konvinki la gravulojn de la mondo ke analfabetismo malaperos, por ĉiam el la mondo kiam oni komencas instrui Esperanton, la facilan kaj utilan internacian lingvon.

Intertempe ni devas senĉese informi la aliajn ke internacia lingvo ekzistas. Ni ne devas perdi tempon konvinkante tiujn, kiuj ne volas esti konvinkitaj. Uzu la tempon por instrui la lingvon al tiuj, kiuj volas lerni ĝin.

Ni devas aĉeti librojn en Esperanto. Alie kial ni lernis la lingvon? Por impresi konatulojn ke ni scias lingvon? Memoru ke eldonistoj volonte eldonas novajn librojn kiam ili scias ke la nombro de la legantoj estas sufiĉe granda.

Ni devas aboni revuojn en la internacia lingvo. Neniu ŝatas presi revuojn kaj librojn por vidi ilin dum multaj jaroj sur la bretoj en la eldonejo.

Kun esperantistoj ni devas paroli en Esperanto. Alie, kial ni lernis ĝin? Oni ne lernas ion ajn por ke oni ne uzu ĝin. Multfoje en esperantaj renkontiĝoj oni trovas ke multaj senĉese babilas nacilingve kvankam ili bone scias la internacian lingvon. Tia situacio ne plaĉas al tiuj, kiuj volas babili esperantlingve.

Oni daŭre inventas dekojn kaj dekojn da metodoj por instrui tiel facilan lingvon. Oni perdas multajn horojn filozofiante pri la plej taŭga metodo. Ekzistas nur unu metodo. Por instrui la internacian lingvon oni devas paroli internacilingve. Eĉ la prahomoj instruis siajn lingvojn kiam ili parolis en ili al la gefiloj.

Kiam “mortis” la latina lingvo? Kiam la homoj ne plu parolis ĝin sed pri ĝi. Por mi la mortiganto de la latina lingvo estis la instruisto kiu instruis ĝin al mi. Li senĉese parolis pri la latina lingvo sed neniam en ĝi. Li eĉ asertis ke tiu lingvo ne estas taŭga por la hodiaŭa mondo. Nun la latina estas mortinta lingvo.

Se ni volos mortigi Esperanton, la internacia lingvo, la plej rekta vojo estas tiu sur kiu la instruisto de la latina lingvo ĉiutage marŝis. Senĉese parolu pri Esperanto sed neniam en Esperanto. Kiam ni esperantistoj parolas inter ni en kiu ajn alia lingvo krom Esperanto, ni estas murdistoj de la internacia lingvo. Homoj kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton pravus kiam ili diras post kiam ili aŭdas nin parolante inter ni nacilingve: “Eĉ la esperantistoj ne bezonas la internacian lingvon!”

Ververe ne nur ni bezonas unu tutmondan lingvon sed ĉiu el la kvar mil milionoj da teranoj. Ni devas vivi la internacian lingvon. Al alilandanoj ni devas skribi en Esperanto. Ni devas iri al la edukaj instancoj por ke la gestudentoj lernu la internacian lingvon en la lernejo. Vesperaj kursoj kvankam utilaj ne sufiĉas por disvastigi Esperanton tra la tuta mondo. La registaroj devas certigi la gestudentojn ke oni povas utiligi la diplomojn en Esperanto por trovi laboron aŭ iri al universitato. Ni devas skribi al la radio-stacioj por ke ili uzu la internacian lingvon kiam ili elsendas programojn por la tuta mondo. Ni devas ankaŭ skribi al tiuj radio-stacioj kiuj jam elsendas en Esperanto, dankante ilin pro la utila laboro kiun ili faras por la disvasti-

go de la internacia lingvo.

Ni devas skribi al plumamikoj kaj plumamikinoj tra la tuta mondo. La esperantistoj devas komuniki inter si. Ni devas kuraĝigi aliajn agi same.

Jes, ni devas fari ĉion. Neniu alia faros ĝin por ni. Feliĉe la vojo estas klara kvankam laborplena. Ni laboru ĉar ni jam scias ke ĝi estas ĉiam fruktodona.

Finfine kiam etulo aŭ etulino demandos nin:

“Kial mi devas lerni la internacian lingvon?”

Ni ĝoje kaj sincere respondu:

“Ĉar la tuta mondo uzas ĝin”.

Kelkaj konsideroj pri avangarda literaturo en Esperanto

Nikolino Rossi

En ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj kulturitaj lingvoj aperas manipulantoj de la lingvaj esprimiloj. Tiuj manipulantoj eksperimentas, t.e. klopodas serĉi kaj eltrovi la plej taŭgajn lingvajn esprimojn por bildigi ideojn, faktojn, emociojn. Tiu malkutima kaj maltradicia envortigo de la lingva esprimo skribita sumiĝas je la ĝenerala difino "avangarda literaturo".

Avangardajn literaturojn konas preskaŭ ĉiuj se ne ĉiuj, nacilingvoj, kies plej brile fekundaj uzantoj, t.e. la verkistoj, ofte emas al priesploroj de novaj esprimformoj poeziaj kaj prozaj. Ankaŭ la esperanta literaturo havas siajn avangardojn. Certe ili ankoraŭ ne estas tiel influaj kaj unuavide okulfrapaj, sed ioma pli atenta prikonsidero malkaŝas al ni ĝuindajn kaj prilumindajn ekzemplojn.

Kio estas avangardo laŭ literatura vidpunkto?

Avangardo estas la maniero lingvoesprimi malkutime, maltradicie, eksternorme difinitan pensoĉenon. En la ĉiutaga parolado kiel ankaŭ en bona tradicio respekta korkostilo, la lingvon subigas kelkaj ĝeneralaj principoj, kiuj daŭre ĉeestas eĉ se ne tuj rimarkeblaj far la lingvouzantoj. Ĉiu lingvo konsistas en sistemo konvencia de signoj-sonoj, vortoj ktp. -nomata kodo. Tiun kodon regas probablecaj leĝoj, tial, ke tiuj signoj ne aperas samkvante kaj samofte dum konversacio kaj verkado. Sekve lingvosignoj, t.e. sonoj kaj vortoj, ne estas samrangaj, ĉar evidente iuj aperas multe pli ofte ol la aliaj.

Ju pli probabla estas la aperofteco de sonoj kaj vortoj des pli rapida kaj facile komprenebla fariĝas la mesaĝo lingva, ĉu skriba aŭ parola. Plej granda probableco en la aperofteco de vortoj kaj sonoj nomiĝas "redundanco" — ĝia malo, plej eta aperofteco de sonoj kaj vortoj nomiĝas "entropio". Do redundanco kaj entropio estas du teknikaj terminoj, kiuj nin helpas pli bone kompreni mian ĉi-sekvan rezonadon. Estas, do, la redundanco, kiu plej rekte kaj frape mesaĝas al ni la ideojn pere de la lingvaj esprimiloj. Unu el la ĉefaj ecoj de la redundanco estas la ordo, ni diru pli bone, la tradicia vortordo. Ni ekzemplu per jena frazo: "katoj ĉasas musojn"

(subjekto - verbo - objekto) temas pri tre orda, tre rapida, tuj komprenebla - sekve tre redundanca esprimo. Ĉu?

Jen ordo inversa: "musojn ĉasas katoj" (objekto - verbo - subjekto) temas pri iom pli malorda, iom pli nekutima, iom pli neredundanca esprimo, kiu frapas iom pli surprize la aŭskultanton kaj postulas jam ioman priatenton por plene kapti la tutan mesaĝon idean. Do en la dua inversa frazo la redundanco, t.e. la tuja komprenebleco, malpliigās kaj la esprimo alproksimiĝas al entropio, al la nekutimo, al la avangardo. Ni citu ekzemplon iom pli frapan: jen kutima frazo redundanca, t.e. rekte kaj rapide komprenebla:

Multaj birdoj kantas sur arbo.

kaj jen ni diru pli malpli la samon eksternorme kaj malkutime:

"varme fringeloj trilas sur platano"

jen frazo kies vortoj estas malpli oftaj, nekutimaj, do pli surprizige atentovekaj, sekve entropiaj kaj *jam avangardaj*.

Frazo kiel "varme fringeloj trilas sur platano" entenas ankaŭ pli da specifaj informoj, pli da detalaj precizigoj, kio komprenigas al ni, ke entropia esprimo signifas pli da detaligitaj kvantoj, da mesaĝaj ideoj, kiuj, siavice, postulas pli da atentostreĉo far la aŭskultanto.

Tiuj premisoj sufiĉu por klarigi al ni, kiom da tradicia, klasikiĝinta kaj rutinesprima lingvaĵo teksas la plejmulton de nia esperanta literaturo poezia kaj proza. Tio ankaŭ komprenigu al ni, kion la tiel prilanda facileco, unusenseco kaj nemiskomprenebleco de la esperantvortelemoj estas lingvaj karakteriziloj *alte redundantaj*, kiuj malfaciligas ĉian avangardstilan verkklopodon. La vera literatura avangardo ekas tie, kie entropiaj esprimoj renversas kaj anstataŭas fiksfarmojn, ritmojn, rimojn kaj regulojn entradiciigitajn. La mirinda fleksebleco kaj kreivo de esperanto provizas la esperantlingvaj literaturajn avangardistojn per ilo senprecedence adaptiĝema kaj ankoraŭ neplene ekspluatita. Ĉar konatas la fakto, ke en la originala esperanto-literaturo la poezio pli abunda disfloris kaj ekfloras ol la prozo, kaj la romano iom postlomas la atingitaĵojn lirikajn, indas ekanalizi kelkajn trajtojn de la avangarda poezio internacilingva.

La moderna poeto avangarda rifuzas antaŭpretajn regulojn kaj emas starigi proprajn esprimmodelojn, klopodante enkonduki en ĉiu nova verko, nekutimajn formojn kaj proponi solvojn ennovigajn. Tro klasikaj fiksfarmoj poeziaj enreigitaj laŭ striktaj reguloj de ritmo kaj rimo ofte kliše banaligas la enhavon kaj senemociigas la elvokivajn efektojn de la lingva teksaĵo. Do, malgraŭ abundaj redundancoj, artefektoj apenaŭ atingeblas. Kontraŭe, tro avangardaj esploroj lingvokreaj, puŝataj ĝis ekstrema entropia esprimeblo apenaŭ kapablas kontentige transdoni percepteblan kaj deĉifreblan mesaĝon al la leganto/aŭskultanto. Do, ankaŭ ĉi tie konstateblas, ke la vera artatingo ĉe la avangardigo de literaturaj poeziesprimoj kuŝas ĉe iu ekvilibra endozigo de redundancaj kaj entropiaj elementoj lingvaj kaj vortelektaj.

Mi limigos mian rapidan analizon nur ĉe kelkaj plej elstaraj figuroj de la esperanta poezimondo, kies nomoj konatas ĉiulande. Ilin epiteti avangardistoj de le Esperanto-literaturo certe elvekos zumadon kaj disputojn, sed je la lumo de la ĉi-

supraj konsideroj, iliaj verkoj povas nur esti rigardataj "avangardaj". Pro mia instinkta malordemo kaj neracia aligo al ĉiuspeca studo, mi citas la aŭtorojn, kiuj plej min impresis kaj pardonpetas pro la preterlaso de tiuj, kiuj meritis citadon, kiujn mi verŝajne ne legis aŭ ne aprecis pro mia nekomprenejo.

Spite la koleriĝon de literaturhistoriistoj, "Geraldo Mattos" estas unu el tiuj poetoj, kiun mi konsideras avangarda ĝuste pro lia verko "Arĉoj", kiuj ja estas sonetaro, do unu el la plej klasikaj kaj tradiciaj formoj de poezio. Malgraŭ tia tradicia ŝajno, "Arĉoj" estas poemaro avangardema, ĝi minimume estas altgrada klopodo esprimi entropie, do lingvoinvente kaj kreive, emociojn kaj ideojn laŭ malkliŝa vortkombino.

Mattos avangardas precipe en la du lastaj cikloj de la sonetaro "taktas vivo" kaj "finalo" kie la lingvo knediĝas "ĝis neimageblaj esprimatingoj".

soneto 67

Mi estas la vespero sen okuloj
kaj mi parfumas en la noktan liton,
dum man' el ombro trudas en mediton
la larĝon de la tago de makuloj.

kaj vivodaŭro gajnas lumsuĉeton
inter centjar de ŝtonoj kaj simuloj ...

Esprimoj kiel la supraj versoj estas nek plene redundancaj nek tute entropiaj, sed iel ili kunigas la ecojn de la du kategorioj en io nova kaj plenekvilibra, kio tanĝas rekto ĉe avangardo.

Ankoraŭ pli altgrade entropie novelas, do pli avangarda, estas la soneto 107a, kies esprimoj preskaŭ netradukeblus nacilingven:

Ĉiam ekulo venas kaj perturbas
per lantaj rememoroj de futuri:
kolor' kaj son' travejne ĝis saturo
en la apertita kapo nin masturbas,

dum la trajno venas el arkturo
kaj saltas nevenenda, kiu turbas;
kaj venas re, kaj venas dis, kaj gurdas
en la okuloj timo de l' veturo! ...

Estas versoj kie la sonoj kaj vortelvokivoj rolas pli esence ol la vorto signifo mem, kaj kie la vortvaloro unuope mesaĝas al ni abundon da informaj detaligoj, laŭ plej avangarda stilmaniero.

Same direndas pri alia verko de alia aŭtoro, pri "ŝtupoj sen nomo" de Baldur Ragnarsson kaj pri liaj postaj poemoj, kie rolas ĉefe la esploro pri plej efika uzado de vortosonoj kaj vortogrupoj, malpli akcentante ilian semantikan valoron alire al pli sonelvokiva kaj emocivola eluzo de la vorto mem. Mi citu nur unu ekzemplon III ag. 32.

Neniu konas min; la mensperturbon
simbolas ŝtorme la nubbar' taŭzita,
psikecaj tromboj kirlas mian cerbon
suĉante pensojn ĝis ŝaŭmiĝ' zenita;

La dua kaj kvara versoj estas avangarda maniero diri la angorajn premojn de psikaj faktoroj sur la memon ĝis diskrevo de ĉiaspeca penso, eluzante vortojn, kies semantikaj rilatoj apenaŭ imageblas en ĉiutaga parolo redundance komunikpova.

Alia eminentulo de la Esperanto-literaturo, William Auld, per sia "La infana raso (Ho ve! mi jam vidas sulkiĝintajn brovojn), verko pritaksita kaj esplorita el pluraj perspektivoj jam ekpaŝis, miaopinie, sur tiu strato avangarda tiel ŝtonoza kaj malfacile irebla. Jen kelkaj citaĵoj el kanto VI:

... ilaj brakoj ogram
sklave policas la antikvan moron,
manipulataj de l' skeletaj ostoj
de pompa pio. Nian rasmemoron
ili profitas, ĉar plej karnaj bestoj
plej timas sian karnon, plej estimas
la sekan testamenton de lokustoj. ...

Kion da potenca inventemo en tiuj versoj nur por diri, ke la homo instinkte obeas leĝon de amoro kaj de reprodukto, spite la malpermeson de religiaj moroj kaj aliaj civilizaj hipokritaĵoj. Kiom malkliŝas la esprimo kaj ne kutimas la vortelekto, kaj kiel skanda estas la ritmo kaj plaĉa la sonoro versa. Jen, mi kredas bela ekvilibro de elementoj entropiaj kaj redundancaj, kio avangardigas la esprimon.

En la sekvaj versoj el "Humoroj" jam pli fortas la koncizo, kiu estas esenca trajto de la poetiko Aulda, pli kaj pli aŭdaca kaj avangarda. Jen alia ekzemplo el "Humoroj":

Paneo paĝ. 70

Iom post iom
likiĝas aero
el ĉi pneumatiko,
la mondo.
Baldaŭ ĝi kunfaldiĝos,
kiel elefanto
senostigita.
Kiu alportos
krikon
kaj rezervan radon
al la paneo
de l' universo?

Fortega esprimivo kaj maŝablona vortokombino por skizi la danĝeron de sindetruonta homaro per koncizo mensofenda kaj tamen riĉa je entropia informabundo.

Estus nepardonebla eraro preteratenti alian koloson de nia poezio. Temas pri Edwin de Kock, sudafrika poeto nekontesteble genia, ankoraŭ ne sufiĉe konata kaj

aprecata far la kritikistoj kaj ankoraŭ ne ĝisfunde pristudita. Lia poezio renversas tradiciojn ritmajn kaj rimajn, alpaŝas firme sur esprimopadoj novaj, kie ekvilibras klasikemaj metaforigoj kaj brilideaj lingvoesploroj, kreante veran avangardan torĉoportanton. Bedaŭrinde ne eblas ĉi tie detale analizi lian verkaron.

De "Ombroj de la kvara dimensio", al "Fajro sur mia lango", al "Kvin elementoj" ĝis lia lasta produktado aperanta sur la nuntempaj literaturrevuoj, estas tuta abunda rikolto da mirinda elvokiva poezio kies tembro kaj esprimforto eluzas ĉiujn eblajn inventojn vortajn por malkliŝigi nian lingvon kaj tirkapti entropio, do informriĉe kaj varie, nian lego- kaj aŭskultatenton. Citi ekzemple kelkajn el liaj versoj estas perfidi la ceterajn, kiuj ĉiam fortas tembre kaj provoke. Tamen jen kelkaj eroj:

El "Fajro sur mia lango"

Tage nubskrapaĵoj, kiel fungoj
de l' epoko, reklamas siluete
sian okcidenton ...

(Sudafriko pĝ. 26)

... Kiel mi sukcesus
en viajn cerbojn ŝraŭbi la konscion
sen la kutimaj belefektoj, nur
per vortoj nudaj kiel morda ŝtalo?

(Devo pĝ. 39)

Kion mi faris por justigi tiujn jarojn?
Sur mia konsciencretino
la bildon de l' epoko splite fendas
potenca, kirasganta pugno de la stulto ...

(Respondeco pĝ. 71)

kaj jen alia plej nova specimeno de lia arto, poemo aperinta en la beletra revuo "Fonto" n-ro 13. Jen kelkaj versoj:

Alian tagomondon ĉiu sun'
konsumas, tavologe sur tavolon,
kun mi post mio en realprovokoj
kaŝota sub la cindron ...

Rimarku kian amasiĝon da nuancitaj mesaĝoj klopodas peri al ni de Kock per elekto de vortkunmetoj kaj apudigo de sonvortoj mensofrapaj, kiuj tradukitaj simplalingven provokas reagojn plej diversajn kaj engaĝas la leganton al profundkonscienca primedito de individuaj kaj tuthomaraj demandoj. Mi kredas ke de Kock estas la vera aŭtentika avangardulo de la esperanta poeziarto.

Alia nepre citinda poeto, juna aŭtoro, kiu fulme ekbrilis ĉe nia literatura horizonto kaj kiu jam raketis al pinto de vera arto avangarda estas la juna italo Mauro Nervi. Mi nepre devas agnoski lian eksterordinaran staturon beletran kaj lian talentan kapablon ekspluati la latentajn de nia lingvo por mesaĝi novstile siajn sentomondon kaj ideojn. Liaj poemoj en "La turoj de l' ĉefurbo", kiel tiuj aperintaj dise en la nuntempaj literaturrevuoj, markas netradician esprimivon, nekutiman metaforigon

de la pensoj, strebon ekvilibrigi redundance kaj entropie la vortelementojn poetikajn.

Ne moku min
per via geometria kompato.

Varma akvo
en miaj oreloj
kaj ĉie turkisaj vesikoj.

(Nenaskoto pĝ. 45)

Mergitaj koŝmaroj silabas obtuze
spasmajn dezirojn; sed en la pugnoj
nur koto amara.

(nur koto amara pĝ. 49)

La karesa stagno
de l' kompatemo preciza
varmete ankoraŭ kvietas:

krispigu ĝin, ho vento,
mi petas.

(Kvazaŭ novan liberon pĝ. 48)

Mi citus multe pli, sed tio sufiĉu por komprenigi, ke la versarango de Mauro Nervi penetras cerben pli pro sonforto de la unuopaj vortoj ol pro enhava signifo de la versoj mem. Ankaŭ ĉe li, arto manipulado de la lingvo, daŭre ŝvebas la klopodo avangarde, do entropie kaj informvarie, serĉi solvojn por plej originala esprimeblo.

Fine, ankaŭ por kurtigi al vi la dedon de aŭskultado, mi nur deziras mencii la verkon "Memkritiko" de Victor Sadler, kiun mi senhezite alskribas al la avangarda solo de nia poezilingvo. Estas verko ankoraŭ tro malmulte pritraktita kaj ne ĝis funde pristudata kaj aprecata fare de la literaturkritikistoj. La lingvaĵo de tiu poemaro, tamen, levas la esprimevoluon internacilingvan al veraj artpintoj pro vortelekto, koncizo, vorta sonapudiĝo entropie mesaĝoriĉaj kaj neniadube avangardaj.

Se la avangarda poezilingvo esperanta lasas sin prispuri kaj analizi, eĉ se abundo ne konstatablas, male la avangarda prozlingvo esperanta apenaŭ troveblas en nia originala literaturo, kaj pri la traduka ĉi tie ne temas kompreneble. Dum avangarda poezilingvo estas relative facile produktelebla far bona aŭtoro sufiĉe talentoplena, ĉar poezio havas kaj koncizon versan, kaj mallongon rakontoteksan -ne same facile produkteleblas avangarda prozlingvo en novelo kaj romano., pro la ega malfacilo gardi tiun eksternorman kaj malkutiman esprimivon tra dekoj kaj centoj da paĝoj, do tra densaj kaj kompleksaj pensoĉenoj.

Tiu eksterkutima, do entropia lingvonivelo postulas tioman intelektan fortostreĉon, tioman genian, lingvoinventan talenton, kiujn oni apenaŭ povas imagi trovi kunigitajn en verkisto, ne nur esperantlingva, sed ankaŭ nacilingva. Tiaj geniuloj estas raraj juveloj, verŝajne nur unufoje troveblaj dum unu tuta jarcento. Esperantistoj ne arĝu al si la rajton kredi, ke nia lingvo tiajn jam posedas. Nek la verkistoj de la frua epoko, nek tiuj de la dua epoko (dua epoko egalulo ĉi tie al la periodo inter la du mondmilitoj) povas esti konsiderataj avangardaj romanistoj. Certe multaj el ili atingis nivelojn de eminenta rakontkapablo, en senriproĉa stilo, sed ja mankas tiu aparta lingva kaj lingvistika esplorkapablo, kiu igas ilin veraj avangarduloj. Ne

multe diferencas la romanproduktado de la lastaj tridek jaroj. Aktivis kaj aktivas pluraj bonaj verkistoj de noveloj kaj romanoj, kiaj Rossetti, Szathmari, Szilagy, Schwartz, Francis, Lorjak, Rosbach, Valano por mencii nur la plej produktemajn. Ĉiuj bonaj, eĉ elegantaj stilistoj prozaj, kapablaj eĉ lertaj rakontistoj de fabuloj, fajnaj regantoj de la lingvaj, ne entropiaj forĝantoj de avangarda skolo, prozlingva.

Bona trarigardo kaj utila pristudo de la esperanta romano estas la verko de W. Auld "Vereco, distro, stilo", kie analizigās kvindeko da romanoj, praktike la tuta citinda produktado originalproza en nia literaturo. Spite lian optimismān konkludon, W. Auld ne klarsence esprimas la konvinkon, ke nia literaturo ekkonis sian avangardon prozan.

Nu, kion do konkludi ke la esperanta literaturo havas avangardan skolon poezian kaj malhavas avangardan prozan?

Tiel ŝajnus, se ne estus okazinta evento lastatempe, kiu esperigas ekeston de avangarda tradicio eĉ sur la proza kampo.

Antaŭ du jaroj, dum mia mutklopoda kaj cerbumiga tralego kaj analizo de la manuskriptaj romanoj konkursantaj por la premio "R. Schwartz" mi havis la bonŝancon legi kaj relegi medite du manuskriptojn de la ĉefa aŭtoro Karolo Piĉ. Tiuj du verkoj, "Klaĉejo" kaj "La Litomiŝa Tombejo" tre skue impresis min kaj min pengis konsciencengaĝe pri kiagrada evoluo entropie avangardema, kapablas esperanto enmane de lingve sentema geniulo. Feliĉe intertempe, la plej grava el la du verkoj, la "Litomiŝla tombejo" aperis libroforme, malgraŭ ke ĝi maltrafis la unuan premion ĉe la konkurso "R. Schwartz". Premio, kiun mi tre favoris kaj subtenis, sed pro malsama opiniado de miaj gekolegoj juĝantoj Karolo Piĉ atingis nur la kvinan lokon. Tio tute ne signifas, ke la "Litomiŝa tombejo" havas malmeritojn, ĝi nekon- testeble pozicias avangarde en nia prozlingvo kaj markas deirpunkton por ĉia avangarda, plus esprimivo prozlingva. Mi deziras citi nur kelkajn erojn de mia komentario, kiu akompanis mian juĝon okaze de la supre citita konkurso: "La stilo estas impresionisme simplega. La frazoj kurtas pokavorte. La granda lingvistika akuŝklopodado antaŭiranta ĉiun frazon, ĉiun parolturnon, ĉiun dialogeron ŝajne ne percepteblas malgraŭ ĝia daŭra ĉeesto.

La lingvoesprimeblo tiom elatiĝas, ke oni miras preskaŭ ĉiufraze pri tioma latentā kapablo ĉe la lingvo mem kaj pri tioma lingva inventemo ĉe la aŭtoro. La ŝvarceskaj vortĵongladoj ĉiam novaj kaj novimpresaj tintaj, al privateskaj, poeziecaj frazoj, de sukaj popularlingvaj amordialogoj, al lirikaj naturfenomenaj bildigoj, la aŭtoro eĉ frazon ne pretervidas en sia longklopoda polurado plej efika, arta esprimeblo lingva kaj elvokivo vortsona. Tial li ne hezitas lingvokree aŭdaci ĝis preskaŭ skandala, lingvotradicia rompo, ĝis senprecedence kuraĝa enkonduko de novismoj substantivaj, adverbaj, afiksaj, prepoziciaj, kiujn li eluzas elegante kaj facilkree, tamen iel laŭfundamente, rekondukante esperanton al ĝia rigora logiko vortfarenda, spite ĉiam naturalisman tendencon. Li akuŝas lingvon malsaman ĉe ĉiu cirkonstanco, tamen lingvon artan, stile mirvekan, vortelekte riĉvarian, vortokree simplan sed ja neeluzitan, sekve jen lingvo atentokapte kaptuniga!

K. Piĉ sorĉas per la vorto, sorĉisto frazkonstruas, faksperte alhemias lingvon no-

van, kiu ja strikte enreliĝas laŭfundamente, spite la preskaŭ herezajn novismojn."

Ke Karolo Piĉ firme alpaŝas la vojon de avangarda prozlingvo ne estas nura mia opinio, mi ĝojis konstati, ke preskaŭ same kiel mi opinias J. Regulo-Perez en artikolo aperinta en la aprila n-ro de Esperanto de UEA. Jen kelkaj citaĵoj el tiu vere valora kompetenta analizo:

"Temas do pri rakonto vortume riĉa, bunta, fojfoje eĉ tro riĉa, ĉiam enhance kaj lingve obseda. La fabulo — lingva kaj rakonta fabulo — veras per siaj lingvointrigo kaj rakontinterplekto tiun, kiuj tra ĝi aventuras ... La unua fabula vero estas tiu pri la lingvo. La esperantuja plimulto opinias, ke Esperanto estas lernolibra (gramatika, vortara, frazeologia) roboto, kiu iel aŭ tiel povas prezenti literaturan surogaton. Kion ja montras tiu ĉi libro, tio estas, ke Karolo Piĉ magie priskribas la manieron, kiel en lernolibroj povas ĉeigi artisma beletro per eksperimento ortodoksa lingvaĵo.

... kaj ĉiu nivelo havas sian propran lingvaĵon, ĉiam tre zorge prilaboritan, same leksikone kiel sintakse, kiel — ĉefe, ĉefege — ritme kaj stilistike. Ĉio konfluas."

Nu kion alian aldoni se ne la konvinkon, ke ankaŭ la proza avangardo ekis sian lantan ekmarŝon al ankoraŭ neimageblaj atingoj de artisma evoluo esprima kaj lingvokrea, kiuj ja latentas en la strukturo de nia planlingvo esperanto.

Rilate la 100-jaran datrevenon de la 16-a Esperanto Konferenco de ILEI decidis pri sia agadplano:

- geinstruistoj el ĉiuj sekcioj dezirantaj transpreni taskojn,
 - kiu povas rekomendi "gravajn personojn" al kiuj ni sendadu informojn pri nia intencata "Internacia Lernejo",
 - kiu trovos la deziratajn librojn, kajerojn, traktaĵojn, artikolojn el unu jarcento
- skribu al Helmut Sonnabend Pappelweg 22 A D-3150 Peine.**

100 Jara datreveno de Esperanto La kontribuoj de ILEI.

1. Internacia Lernejo

Sekve de niaj spertoj rilate *Internaciajn Lernejojn*, ni organizos en 1987 *Internacian Lernejon* aŭ en Lokarno aŭ en Internacia Domo Sonnenberg al kiu partoprenu 60 ĝis 80 infanoj inter 10 kaj 14 jaroj laŭ aĝo, laŭeble el malsamaj kontinentoj proksimume inter 12 ĝis 16 infanoj (Esperanto-kono: progresintaj kaj denaskaj i.)

La evento okazu kunlabore kun internaciaj Esperanto-organizaĵoj sub la aŭspicio de Unesko, ŝtataj organoj, FINEM.

La *Internacia Lernejo* daŭru unu semajnon sub la kadra temo:

Unu homa familio kaj unu lingvo

La instrua tabelo estu jena: infanoj en la mondo, urboj, popolaj kantoj, dancoj, muziko, pentrado, sporto kaj matematiko.

Bezonataj estas 15 geinstruistoj el la koncernaj landoj kaj 12 helpantoj.

Preparoj:

Jam nun ni bezonas po 30-40 instruistoj el partoprenontaj landoj, kiuj estas pretaj dediĉi tempon, intelekton kaj helpon.

Preparinstruado komenciĝu por po 40-50 infanoj de partoprenontaj landoj ekde 1984 aŭ 1985 kun infanoj inter 8 kaj 11 jaroj.

2. Fakula konferenco okaze de la Internacia Lernejo

Kombine kun la Internacia Lernejo ILEI invitos kvindek zorge elektitajn pedagogojn (akademiaj profesoroj, membroj de lingvistikaj esplorinstitutoj), reprezentantojn de UNESKO, laŭeble el la landoj, el kiuj venas la infanoj, ili estu observantoj de la I.L.

- Posttagmeze okazu diskutoj
- pri la antaŭtagmezaj lecionoj
- pri la eblecoj kiujn malfermas internacia lernejo
- pri la lingvistika aspekto de Esperanto kiel instrulingvo kompare instruitajn naciajn lingvojn

Preparlaboroj:

ILEI jam nun elektu por siaj intencoj 150 gravajn personojn el la diversaj landoj, kiuj tre cele kaj profunde estu informitaj pri ĉiuj rezultoj de nia laboro kaj ni ankaŭ starigu personajn kontaktojn.

3. Kompilado de bibliografiaĵoj pri pedagogio/metodologio, ceteraj fakaj verkoj skribitaj en Esperanto

ILEI alvokas nun Esperantistojn en la plej diversaj regionoj, landoj kaj kontinentoj esplori la proprajn Esperanto-librarojn, viziti Esperanto-bibliotekojn, demandi konatulojn pri eblaj fontoj:
Plue ILEI demandos bibliotekojn, ligojn, asociojn, centrojn pri nia serĉata literaturo.

Ni bezonas ĝin laŭ tri kategorioj:

- libroj
 - traktaĵoj
 - artikoloj
- verkitaj dum 100 jaroj. Necesas jenaj indikoj:
1. Verkisto-verkinto-aŭtoro
 2. eldonejo
 3. titolo
 4. aperjaro
 5. se eble tre konciza priskribo

Ĉiuj kontribuaĵoj estos esploritaj, ordigitaj, kompilitaj kaj eldonitaj en broŝura formo en la vico

- kajeroj
 - de internacia pedagogia revuo
- La broŝuro estas eldonota sub la titolo pedagogia verkado en internacia lingvo esperanto kolektita el unu jarcento

La solena prezentado estu okaze de la Internacia Lernejo

Internacia Ligo Esperantistaj Instruistoj

ILEI

17a Internacia Konferenco

Sintra (Portugalujo) Hotel Tivoli - 14-22 / 7 / 1983

ILEI

LKK

Dazzini Mario
Casella Postale 22
54100 Massa (Italujo)
Telef. 0585/41756

Inĝ. Adelino Franco Simoes
Rua Dr. João Couto 6 R/C A
1500 Lisboa (Portugalujo)
Telef. 19/741359

ALIĜILO

(Bonvolu skribi klare, legeble, laŭeble tajpe aŭ preslitere)

S-ro (S-rino, F-ino)

Familia nomo Antaŭnomo

Lando Naskiĝjaro

Loĝurbo Strato n°

Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo:

Edz(in)o infanoj

Kotizoj

Tranokto kun kompleta pensio

	31/12/82	1/1/83—31/3/83
unulita ĉambro	35.240 Port. Eskud.	37.740 Port. Eskud.
dulita ĉambro po persono	27.240 Port. Eskud.	29.740 Port. Eskud.

Tranokto kun duopensio

unulita ĉambro	29.640 Port. Eskud.	32.140 Port. Eskud.
dulita ĉambro po persono	19.140 Port. Eskud.	24.140 Port. Eskud.

Tranokto kun nur matenmanĝo

unulita ĉambro	24.000 Port. Eskud.	26.500 Port. Eskud.
dulita ĉambro po persono	16.040 Port. Eskud.	18.540 Port. Eskud.

La samideanoj kaj simpatiantoj kiuj deziras nur aliĝi al la konferenco devas pagi 2.500 portugalajn eskudojn. La familianoj pagas la duonon, tio estas 1.250 portugalaj eskudoj.

Mi sendas la aliĝilon al L.K.K. kaj mi verŝas la kotizon, laŭ la suprenindikitaj tarifoj, por 8 kompletaj tagoj de la vespero de la 14/7/83, al bankkonto:

CAIXA GERAL DE DEPOSITOS

Agência Central da Rua do Ouro, 49

1153 LISBOA Codex (Portugal)

Konto n° 497608/620 — ILEI — 17a Internacia konferenco

aŭ per poŝt-internaciaj mandatoj al la sama adreso.

Dorse de la enpagilo menciuj nepre: Familia Nomo kaj antaŭnomo — adreso — elektita kategorio. (Post la ricevo de la kompleta pago oni havigos la konfirmilon)

Atentu LKK ne certigos loĝadon al tiuj kiuj aliĝos post la 31/3/1983.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

- Aŭstralujo: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo: Ernst Rixner Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
Belgujo: E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-2180 Kalmthout.
E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Mettel.
M. Sondervorst, Rue du téléphone 1, B-2180 Mettel.
H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes.
Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Brazilo: Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE 9 8HH.
Britujo: Hristo Gorov, B.E.A., Hristo Botev 97, Sofio Centro.
Bulgarujo: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Danujo: Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Finnujo: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
Francujo: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.
F R Germanujo: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Grekujo: Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hispanujo: Zsuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.
Hungarujo: M. Saghafian, Apt. 7 N° 34 24th Street Geesha, Ave. Teheran 14488.
Irano: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170 Reykjavik.
Islando: Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
Israelo: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Italujo: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Japanujo: Miodgrad Stojanoviĉ, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.
Jugoslavujo: Manuel Angel M., Apartado Aéreo 60179, Medellín.
Kolombujo: Robert Hoenecker, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Luksemburgo: Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.
Malto: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.
Nederlando: John H. Fulton, 33365 Avenue F, Yucaipa, CA-92399 USA.
Nordameriko: Elling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.
Norvegujo: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.
Nov-Zelando: Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa.
Polujo: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1° Esq. Lisboa Marques.
Portugalo: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.
Sanmarino: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.
Sovetujo: Nikolaj Starodubcev, Poŝtrestante SU-3-340047 Doneck.
Sud-Afriko: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.
Svedujo: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.
Venezuelo: Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

Izolitaj Membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Pribram.
Ĉinujo: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Ĉinujo: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Germana D R: Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.
Jemena PDR: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Kubo: Eugene Raveloson, B.P. 127, Antananarivo.
Malagasujo: Hongi Liao, apt blk. 14,2809 H, Eunon Crescent, Singapuro 14.
Singapuro: Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu.
Zairujo:

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polić-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Jugoslavio.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicesekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Colegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,
FR Germanujo

membreco en I.L.E.I. inkluzivas la ricevon de IPR

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: Stockholmo 682-117-7 I.L.E.I.
Bantorget 3 S-22229 Lund, Svedujo.
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro